the doubt whether we should mail the Christmas number to your address. We are confident that you do not want to miss any number of our improved Esperantisto.

\* \* \*

*Stamps.* Our special offer of giving all those who return the stamps by September 1st the desk edition of the American Esperanto Key, has resulted in good returns. There are still some outstanding and we urge those who have not returned them or sent in their remittance, to do so without delay.

\* \* \*

*The Time Limit* for the Christmas number of Amerika Esperantisto is October 17th. Have all your reports and news items in by that time. Do not forget that the next copy is our *Christmas Number*. Make a present to your friends; give them a subscription for the Amerika Esperantisto as a Christmas gift. We shall mail the copies shortly before Christmas with a specially hand-painted Christmas card painted by our Central Office artist.

\* \* \*

*Full Addresses* are necessary for our mailing list. So when you write out your Registration Card, make your address complete. This also pertains to correspondence. And please, notify us of any change of your address immediately to avoid returning of your shipments or the copies of A. E.

\* \* \*

*Back Numbers of Amerika Esperantisto* will be sent free of charge to our regular subscribers if by any chance they did not receive their copy. Just mail us a postal stating the missing number.

\* \* \*

*The Students Page* will again appear in the next issue.

### Niaj Mortintoj


Mrs. Louise Thorne Morehouse, of Topeka, Kansas, died August 4, 1931. She was the wife of our beloved Hon. Geo. P. Morehouse, president of Topeko Esperanto Association, and Secretary of the Authors' Club, of which Mrs. Morehouse was a charter member. Our sincere condolence is extended to nia samideano and his family.

J. H. FAZEL.

*Jubilea Matrikulo*, de Sveda Esperanto-Federacio estis eldonita okaze de la 25jara ekzistado de la S. E. F. kaj konsistas el notindaj datoj el la historio de la Sveda Esperanto-movado, helpaj organizoj, kaj portretoj de Svedaj Esperanto-pioniroj. Inter aliaj troviĝas bildo de nia ŝatata Ĝenerala Sekretario, S-ro J. J. Sussmuth, kiam li en la jaro 1901, redaktadis Esperanto-rubrikon en la "Sodertelge Tidningen" kun kurso por komencantoj kaj semajna revuo. La libro ankaŭ enhavas adresaron kaj interesajn nun-tempajn informojn pri organizoj k. t. p. Ĝi estas bele presita kun multaj ilustraĵoj sur bona papero.

A. F. D.

## Nia Biografio



*Rev. John H. Fazel*

NASKITA en la jaro 1855 la 10an de Julio, proksime de la eta vilaĝo Orion, Wisconsin en malgranda ŝtipa kabano sur la bieno de lia patro, kiu estis farmisto. Liaj unuaj lecionoj estis ricevita de lia kara patrino, kiu estis ne nur farmistedzino, sed ankaŭ la instruistino de siaj kvar filinoj, kaj la lernolibro estis la sankta Biblio.

John Henry Fazel estis la plej maljuna filo; tial li unue fariĝis "farmisto en la valo." En 1875 li edziĝis je Phebe Willan, kiu poste ankaŭ fariĝis Esperantistino, kaj la patrino de kvar infanoj. Fidela edzino! Nun ŝi transloĝis, Marto 7an, 1928 en sian ĉielan hejmon.

Kiel junulo, S-ro Fazel eklernis Stenografion. Poste, kun lia familio li forlasis sian nasklokon, kaj vojaĝis al Sandwich, Ill. kie li laboris du jarojn kiel stenografiisto en ventmuela fabrikejo.

En la jaro 1884 li transloĝis al Winfield, Kansas, kie li malfermis komerclernejon kune kun sia frato Karlo; instruante stenografion, librotendon, kaj aliajn komercajn studadojn dum kelkaj jaroj. En la jaro 1887 li vendis la lernejon al sia frato, kaj transloĝis al Wichita, Kansas, kie li fariĝis oficiala raportisto en la juĝejo, kaj studis leĝon por fariĝi legisto, sed antaŭ ol li povis fini la studadon, li ricevis vokon por fariĝi predikisto. Tio sonas kiel ŝerco; sed, ne. Li sentis ke la voko

venis, ne nur de homoj, sed ankaŭ vere de Dio; kaj sen la kutima akademia preparado, li akceptis la vokon, kaj fariĝis pastro de unu tre malgranda, (kaj malriĉa) eklezio, entenante nur 77 membrojn, precipe virinojn kaj infanojn. Tie li predikis dum pli ol naŭ jaroj; kaj tiel sukcesis ke li lasis ne nur 77, sed 364 aktivajn membrojn.

Ricevante peton por iri al Oklahoma, li forlasis Wichita, kaj fariĝis Presbiteria Evangelisto de ĉiuj senpastraj (10) eklezioj en granda parto de Oklahoma kaj Indiana Teritorioj. En tiu laboro li daŭris dum sep aŭ pli jaroj, laborante kun granda sukceso; organizante dek novajn ekleziojn, kaj direktante la konstruadojn de ses preĝejoj.

Ĉar lia sano, kaj tiu de lia edzino ne estis bona, ili demetis la feliĉan amlaboron, kaj reiris al Kansas-o en 1906 kaj aĉetis malgrandan bienon proksime de Topeka, kaj kulturis la teron dum du jaroj.

Dum la tempo kiam li estis denove farmisto li fariĝis malsaneta kaj ne povis dum unu aŭ du semajnoj labori. Tiam li estis abonanto de la Christian Herald, de Novjorko, kies redaktoro estis T. DeWitt Talmadge. En tiu semajna ĵurnalo sin trovis kurso de lecionoj pri Esperanto, kondukita per S-ino Wilbur F. Crafts, de Washington, D. C. Antaŭe li estis studanto de Volapuk, eĉ ĝis li povis korespondi kun aliaj Volapukistoj, sed tio ne sukcesis, kaj ĉar li ne povis labori, li studis la Esperantajn lecionojn, kaj trovante la studadon tre agrabla daŭris la studadon post lia resaniĝo, kaj eĉ ĝis nun.

Tio okazis en la jaro 1908; Post du jaroj li vendis la bienon kaj denove predikis en Topeka ĝis la komenco de la mondmilito. Tiam en la printempo de 1917 li ricevis vokon por esti armea pastro kaj akceptante, li eniris la 90an Divizionon sub Generalo Ruckman, kaj servis en la Tendaroj Kelly Field, Ft. Sam Houston kaj Tendaro Travis, ĉiuj proksime de San Antonio, Texas. S-ro Fazel instruis klasojn da oficistoj, kaj de simplaj soldatoj en la lingvo Esperanto. Unu Roto da soldatoj studis la Francan lingvon dum preskaŭ unu jaron, kaj tiam la militestraro sendis ilin al—Italio! Ha.

La devizo de S-ro Fazel estis ĉiam en ĉiu klaso, "Uzu Ĝin, aŭ Perdu Ĝin." Nu, la plejmulto de ili ne nur perdis ĝin, sed, ho ve! perdis ankaŭ la vivon sur la militkampoj.

Post la milito li reiris Topekon, kaj tie li fariĝis skoltestro, kaj eĉ Regionestro por tiu teritorio dum du-tri jaroj.

Tamen, vintre kaj somere li instruis klasojn en Esperanto, eĉ ĝis nun. Ankaŭ li predikis en la sekvantajn jarojn ĝis li fariĝis tro maljuna; tiam li, laŭ lia peto estis "Honorinde Retirata" por ricevi pencion dum la vivo.

(Daŭrigata sur paĝo 20)

## La Translokita Fantomo

De FRANK R. STOCKTON

Tradukita de EDWARD S. PAYSON  
Honora Prezidanto de la Esperanta Asocio  
de Norda Ameriko

La kampa domo kaj bieno de sinjoro Johano Hinckman estis plezurega loko por mi, pro multaj kialoj. Ĝi estis la loĝadejo de afabla, kvankam iom impulsema, gastameco. Ĝi havis larĝajn, glate tonditajn herbejetojn kaj altegajn kverkojn kaj ulmojn; troviĝis boskaj ombraĵoj ĉe kelkaj lokoj, kaj ne malproksime de la domo fluis rivereto trans kiu streĉiĝis kruda ponto kun arboŝelo sur si; estis fruktoj kaj floroj, agrablaj homoj, ŝako, biliardo, veturoj, kaj fiŝkaptado. Ĉi tiuj estis fortaj allogaĵoj; sed neniu el ili, nek ĉiuj kune, estus sufiĉantaj por teni min ĉe la loko tre longe. Mi estis invitita dum la truta sezono, sed sendube mi estus fininta mian viziton frue en la somero, se ne estus okazinta, ke dum helaj tagoj, kiam la herbo estis seka, kaj la suno ne estis tro varma, kaj la vento iomete blavis, promenadis sub la altegaj ulmoj, aŭ trairis la arbarajn ombraĵojn la formo de mia Madelino.

Ĉi tiu fraŭlino ne estis vere, mia Madelino. Ŝi neniam donis sin al mi, kaj mi neniel akiris posedon de ŝi. Sed ĉar mi opiniis, ke posedi ŝin estis la sole sufiĉa kialo por daŭrigi mian ekzistadon, mi nomis ŝin, en miaj revoj, mia propra. Eble mi ne estus devigita limigi la uzon de ĉi tiu poseda pronomo al miaj revoj se mi estus confesinta al la fraŭlino mian amon.

Sed ĉi tio estis nekutime malfacila afero por fari. Ne nur mi timis, kiel timas preskaŭ ĉiuj amantoj, fari tion, kio tuj finus tiun ravan sezonon, kiun oni povus nomi la antaŭdemandada periodo de amo, kaj kio samtempe povus ĉesigi ĉian interkomunikadon aŭ kunulecon kun la objekto de mia pasio; sed mi ankaŭ terure timis Johanon Hinckman. Ĉi tiu sinjoro estis bona amiko mia, sed estus postulita pli kuraĝa viro ol mi estis je tiu tempo, por peti de li la donacon de lia nevino, kiu estis la dommastrino, kaj laŭ lia propra ofta raporto, la ĉefa apogilo de liaj pasantaj jaroj. Se Madelino konsentus kun mi pri miaj ĝeneralaj opinioj pri tiu temo, eble mi estus kuraĝinta prezenti la aferon al sinjoro Hinckman; sed, kiel mi antaŭe diris, neniam mi demandis de ŝi ĉu ŝi konsentus esti mia. Mi pensis pri tiuj aferoj dum ĉiuj horoj de la tago, kaj nokto, precipe la nokto.

Unu nokton mi kuŝis ne dormanta, en la granda lito en mia vasta ĉambro, kiam, per la nehela lumo de la nova luno, kiu lumo parte plenigis la ĉambron, mi vidis Johanon Hinckman starantan apud granda seĝo proksime de la pordo.

Mi estis treege surprizita pri tio pro du kialoj. Unue, mia gastiganto neniam antaŭe eniris mian ĉambron; kaj, due, li estis foririnta de hejmo tiun matenon, kaj li ne atendis reveni ĝis post kelkaj tagoj.

Tial mi estis povinta sidi tiun vesperon pli malfrue ol kutime kun Madelino sur la lunhela portiko. La figuro estis certe tiu de Johano Hinckman en lia ordinara vestaĵo, sed je ĝi estis ia malprecizeco kaj malklareco kiu baldaŭ certigis min, ke ĝi estas fantomo. Ĉu la bona maljuna viro estis mortigita? kaj ĉu lia spirito alvenis por min sciigi pri la afero, kaj konfidi al mi la protektaĵon de sia kara—? Mia koro ekbatis pri tio, kion mi estis pensonta, sed je tiu momento la figuro parolis.

“Ĉu vi scias,” li diris, kun vizaĝo kiu montris maltrankvilecon, “ĉu sinjoro Hinckman revenos hodiaŭ nokte?”

Mi opiniis, ke estas bone konservi trankvilan mienon, kaj mi respondis:

“Mi ne atendas lin.”

“Mi ĝojas pro tio,” diris li, eksidante en la seĝon apud kiu li staris. En la daŭro de du jaroj kaj duonon dum kiuj mi loĝis en ĉi tiu domo tiu viro neniam antaŭe estis for eĉ unu nokton. Vi ne povas imagi la liberecon kiun lia foresto donas al mi.”

Kaj kiam li parolis li elstreĉis siajn krurojn, kaj reklinis sin en la seĝon. Lia formo fariĝis malpli neklara kaj la koloroj de lia vestaĵo iĝis pli videblaj kaj evidentaj, dum esprimo de kontenta libereco anstataŭis la maltrankvilecon de lia vizaĝo.

“Du jarojn kaj duonon,” mi ekkriis. “Mi vin ne komprenas.”

“Estas tute tiel longe,” la fantomo, “de kiam mi unue venis ĉi tien. Mia situacio ne estas ordinara. Sed antaŭ ol mi parolos plue pri ĝi, permesu ke mi demandu de vi se vi estas tute certa, ke sinjoro Hinckman ne revenos hodiaŭ nokte?”

“Mi estas tiel certa pri ĝi, kiel oni povas esti pri io,” mi respondis. “Li hodiaŭ veturis al Bristol, du cent mejlojn for de ĉi tie.”

“Do, mi daŭrigos,” diris la fantomo, “ĉar mi ĝojas, ke mi nun havas bonan okazon paroli al vi, kiu aŭskultos al mi; sed se Johano Hinckman revenus kaj trovus min ĉi tie, mi estus terure timigata.”

“Tio estas tre stranga,” mi diris, treege konfuzita pro tiu, kiun mi aŭdis. “Ĉu vi estas la fantomo de sinjoro Hinckman?” Ĉi tio estis riska demando, sed mia kapo estis tiel plena de aliaj emocioj, ke ŝanĝis esti nenia spaco por la emocio timo.

“Jes, mi estas lia fantomo,” respondis mia kunulo, “tamen mi ne havas rajton esti tiu. Kaj jen estas tio, kio tiom maltrankviligas min, kaj

tiel multe timigas min. La afero estas stranga, kaj, vere, mi kredas, senegala ekzemplo. Antaŭ du jaroj kaj duono Johano Hinckman estis danĝere malsana en ĝuste ĉi tiu ĉambro. Unufoje li estis tiel malsana, ke oni kredis lin vere senviva. En konsekvenco de tro rapidega raporto rilate al ĉi tiu afero mi estis je tiu tempo nomita por esti lia fantomo. Imagu mian suprizon kaj teruron, sinjoro, kiam, post mia akcepto de la posteno kaj prenis sur min ĝiajn respondecojn, tiu maljuna viro reviviĝis, kaj fine li atingis sian ordinaran sanon. Mia stato estis tiam ekstreme ĝenanta kaj embarasa. Mi ne havis la povon reveni al mia originala senkorpeco kaj mi ne havis la rajton esti la fantomo de viro, kiu ne estas senviva. Miaj amikoj konsilis, ke mi tenu kviete mian postenon, kaj ili certigis min, ĉar Johano Hinckman estis iom maljuna viro, ke mi povos, post ne longa tempo, rajte ekpreni la postenon por kiu oni estis elektinta min. Sed mi diras al vi, sinjoro," li daŭris kun animeco, "tiu maljunulo ŝajnas tiel fortika, kiel iam antaŭe, kaj mi havas nenian ideon kiom pli longe ĉi tiu ĉagrena stato daŭros. Mi pasigas mian tempon penante eviti tiun maljunulon. Mi devas ne forlasi ĉi tiun domon, kaj li ŝajnas sekvi min ĉien. Mi diras al vi, sinjoro, li fantomas min."

"Vere tio estas stranga stato de aferoj," mi diris. "Sed kial vi timas lin? li ne povus malutili vin!"

"Kompreneble ne," diris la fantomo. "Sed eĉ lia apudesto estas skuo kaj teruro al mi. Imagu do, sinjoro, kiel vi sentus se mia situacio estus via propra."

Mi tute ne povis imagi tion. Mi simple tremetis.

"Kaj ĉiaokaze se oni devas esti senrajta fantomo," daŭrigis la aperaĵo, "estus pli agrable esti la fantomo de iu alia viro ol Johano Hinckman. Li havas ekkoleremon de humoro, akompanitan de facileco de satiro, kiun oni malofte renkontas. Kaj kio okazus se li vidus min, kaj eksciis, kiel mi estas certa, ke li eksciis, de kiam kaj kial mi loĝas en lia domo, mi apenaŭ povas imagi. Mi lin vidis en liaj paroksismoj de kolero; kaj, kvankam li ne pli malutilis la homojn kiujn li insultis, ol li malutilis min, ili ŝajnis tremeti antaŭ li."

Ĉion ĉi tion, mi, scias, estas tre vera. Escepte pro ĉi tiu karakteraĵo de sinjoro Hinckman, eble mi estas pli volonta paroli al li pri lia nevino.

"Mi kompatas vin," mi diris, ĉar mi efektive komencis havi simpatian senton al ĉi tiu bedaŭrinda aperaĵo. "Via sorto estas ja serioza. Ĝi rememorigas min pri tiuj personoj kiuj havas duoblulojn, kaj mi supozas, ke oni ofte estu ja tre kolera kiam li eksciis, ke ekzistas alia estaĵo kiu personigas lin."

"Ho, la cirkonstancoj ne estas similaj," diris la fantomo. "Duoblulo aŭ 'doppelganger,' vivas sur

la tero kun viro; kaj ĉar li estas precize simila al tiu viro, la duoblulo kompreneble kaŭzas ĉian ĝenajon. La afero estas tre malsama ĉe mi. Mi ne estas ĉi tie por vivi kun sinjoro Hinckman. Mi estas ĉi tie por anstataŭi lin. Nu, tre kolerigus Johanon Hinckman se li eksciis pri tio. Ĉu vi ne scias tion?"

Mi senprokraste konsentis.

"Nun, ĉar li estas for, mi povas esti trankvila iomete da tempo," daŭrigis la fantomo; "kaj mi tre ĝojas havi bonan okazon paroli kun vi. Mi ofte venis en vian ĉambron kaj fikse rigardis vin dum vi dormis, sed mi ne havis la kuraĝon paroli al vi ĉar mi timis, ke se vi parolus kun mi, ke sinjoro Hinckman aŭdus vin, kaj venus en la ĉambron por ekscii kial vi parolas al vi mem."

"Sed ĉu li ne aŭdus vin?" mi demandis.

"Ho ne!" diris la fantomo: "kelkfoje kiu ajn povas vidi min, sed neniu aŭdas min krom la persono al kiu mi alparolas."

"Sed kial vi deziras paroli kun mi?" mi demandis.

"Ĉar," respondis la fantomo, "mi ŝatas okaze paroli al homoj, kaj precipe al tia homo, kia vi estas, kies cerbo estas tiel ĝenata kaj maltrankvila, ke vi kredeble ne estos timigata de vizito de unu el ni. Sed mi precipe deziras peti, ke vi faru komplezon al mi. Estas treege kredeble, laŭ mia opinio, ke Johano Hinckman vivos ankoraŭ longan tempon, kaj do mia situacio fariĝas netolerlebla. Mia granda deziro nun estas esti translokita, kaj mi opinias, ke eble vi povas esti utila al mi."

"Translokita," mi demandis. "Kion vi intencas per tio?"

"Tio, kion mi intencas?" diris la alia, "estas ke nun, ĉar mi ekiris je mia kariero, mi devas esti la fantomo de iu, kaj mi deziras esti la fantomo de viro kiu estas efektive senviva."

"Mi opinius, ke tio estus sufiĉe facila," mi diris. "Bonaj okazoj nepre senĉese okazas."

"Tute ne! tute ne!" diris mia kunulo rapide. "Vi havas nenian ideon kia puŝigado kaj premeado ekzistas por havigi tiajn oficojn. Kiam ajn vakantaĵo okazas, se estas permesate al mi esprimi min tiamaniere, estas amaso da petoj por la fantomeco."

"Mi ne havis ideon, ke ekzistas tia stato de aferoj," mi diris, fariĝante tre interesata pri la afero. "Oni devas aranĝi ian precizan sistemon, aŭ metodon de rangoj, laŭ ku vi povus ĉiuj havi viajn vicojn simile al atendantoj en barberejo."

"Ho ve, tio tute ne sukcesus!" diris la alia. "Kelke da ni devus atendi por ĉiam. Estas ĉiufoje granda puŝigado kiam ajn bona fantoma situacio prezentas sin—kvankam, kiel vi scias, estas kelkaj situacioj kiujn neniu deziras akcepti. Ĉar mi tro rapidigis min en tia okazo, mi metis min en nunan malagrablan dilemon, kaj mi pensis, ke

eble vi helpas min eligi. Eble vi scias pri mal-sanulo kie oportuna ozazo por fantomeco ne estas ĝenerale atendita, sed eble prezentus sin je kia ajn momento. Se vi povus sciigi min ĵus antaŭe, mi estas certa, ke mi povus aranĝi por transloko.”

“Kion vi intencas?” mi ekkriis. “Ĉu vi deziras, ke mi mortigu min? aŭ fari mortigon por vi?”

“Ho, ne, ne, ne!” diris la alia, kun vapora rideto. “Mi intencas nenion tian. Certe estas geamantoj kiujn oni observas kun sufiĉe granda intereso, ĉar oni scias, ke tiaj personoj, je momentoj de malĝojo, prezentas tre dezirindajn fantomecojn; sed mi ne pensas pri tio pri vi. Vi estas la sola persono kun kiu mi deziris paroli, kaj mi esperis, ke vi povos doni al mi ian informon kiun mi povus uzi; kaj, pro tio, mi tre ĝoje helpas vin pri via ama afero.”

“Ŝajne vi scias, ke mi havas tian aferon,” mi diris.

“Ho jes!” respondis la alia, oscedetante, “mi ne povus esti ĉi tie tiel multe, kaj ne scii pri la tuta afero.”

Estis io terura en la ideo, ke Madelino kaj mi estis observataj de fantomo, eĉ, eble, kiam ni vagadis kune en la plej ravantaj kaj boskaj lokoj. Tamen, ĉi tiu fantomo estas tute eksterordinara, kaj mi ne povus senti la malŝaton kiu ordinare montriĝus en rilato al tiaj estaĵoj.

“Mi devas nun foriri,” diris la fantomo, stariĝante: “sed mi vidos vin ie morgaŭ nokte. Kaj rememoru—vi helpu min, kaj mi helpos vin.”

La sekvintan matenon mi havis dubojn ĉu estus konvene diri al Madelino ion pri ĉi tiu interparolado, kaj baldaŭ mi konvinkis min, ke mi devas resti silenta pri la afero. Se ŝi sciis, ke estas fantomo en la domo, eble ŝi tuj forlasus la lokon. Mi ne parolis pri la afero, kaj tiel konformigis mian konduton, ke mi estas tute certa, ke Madelino neniam suspektis tion, kio okazis. Dum iom da tempo mi estis deziranta, ke sinjoro Hinckman forigu sin, almenaŭ dum unu tago, de la bieno. En tia okazo, mi opiniis, ke eble mi pli facile kuraĝigus min por paroli al Madelino pri la temo de nia estonta kuna ekzistado; kaj nun, kvankam la oportuna tempo por tia interparolado efektive alvenis, mi ne estis preta utiligi ĝin. Kio fariĝus de mi se ŝi min malakceptus?

Mi havis ideon, tamen, ke la fraŭlino opiniis, ke se mi iam parolos, jen estas la deca tempo. Ŝi nepre sciis, ke iaj sentimentoj naĝas en mi; kaj ŝi ne estis senprudenta en sia deziro vidi la aferon decidita jese aŭ kontraŭe. Sed mi ne tute volis aĝi sen antaŭscio. Se ŝi dezirus, ke mi petu, ke ŝi donu sin al mi, ŝi devus prezenti al mi ian kialon por supozi, ke ŝi faros la donacon. Se mi vidis nenian kredeblecon, ke tia malavareco okazus mi preferus, ke aferoj restu kiaj ili estas.

(Daŭrigota)

## Scherer's Lecture Tour Through America

We have just received information that Mr. Joseph R. Scherer, Official Delegate of the I. C. K. and Extraordinary Delegate of E. A. N. A., will return to America at the beginning of January. He is prepared to give lectures on his trip around the world with Esperanto. These lectures will be given under the auspices of E. A. N. A. All Chapters, or such clubs who expect to become Chapters in the near future, should notify us at once whether they wish Mr. Scherer to come to their city to give a public lecture. These lectures will be a tremendous advertising medium for our movement. They will be held in both Esperanto and English and accompanied with slides from all countries where he has traveled with the aid of Esperanto.

All Chapters are urged to send in their application at once and we shall give them all the necessary information regarding cost, publicity, time, etc.

Here is your second chance to put Esperanto on the map in your locality. List your club now and take this matter up at the next meeting for definite action.

## Creative World Magazine

The Creative World Magazine, a new periodical appearing in Los Angeles, whose purpose it is to bring creative minds and the international market for ideas closer together, has established an interesting department known as the “Esperanto Section.” It is of interest to note that these pages are edited by our good friend and Vice-President, Parley Parker Christensen. These columns contain news of the spread of Esperanto and information about the movement, and among other things there is a news item reporting the founding of the “International Society of Creative Minds,” and the fact that this new organization has adopted Esperanto as its auxiliary language, to facilitate the exchange of ideas between creative minds of all countries.

## Rotaria Esperanto-Amikaro (R. E. A.)

### Auxiliary Language Resolution Passed by Rotary International

Through the efforts of Sir Charles Mander, Georges Warnier, J. D. Applebaum, and delegates of the Rotary Club of Napa, Cal., the need of an international auxiliary language was made apparent and emphasized at the 22nd Congress of Rotary which met in Vienna last July. As a result of these endeavors, there was a discussion about Esperanto during the official program by Sir Charles Mander, past president of British Rotary. Realizing the significance of Esperanto in connection with the work of Rotary the congress passed the following resolution unanimously:


Whereas, in all effort toward the attainment of the Sixth Object of Rotary, we are at once met by the problem of language barrier, and

Whereas, it seems certain that until language barrier is overcome, complete attainment of our Sixth Object is improbable; Now therefore,

It is resolved by Rotary International assembled in its 22nd annual convention, that the problem of language barrier and its relation to the Sixth Object of Rotary and its solution are (and they are hereby declared to be) matters of importance and concern to Rotary International.

It is further resolved that the International Service Committee of Rotary International is hereby instructed to investigate as to what course will be most effective to accomplish the acceptance adoption and promulgation of such language by all nations as auxiliary to their national tongue, and report their recommendations to the Board of Directors of R. I.

*Cobourg, Ont., Canada.* Mr. Henry W. Fisher has been actively working in Rotary circles and has during the summer delivered addresses to many Rotary Clubs in the States of New York, New Jersey, Florida and Ontario, Canada.



*Left to Right*—Dr. Jur. Arnhold, Dresden; Georges Warnier, Paris, and J. J. Applebaum, Liverpool, who demonstrated the value of Esperanto at the 22nd International Rotary Congress in Vienna.

Rotary Song translated into Esperanto by Henry W. Fisher and B. W. Reich:

“HO ROTARI!”

Ekzistas klub' en kiu loĝas paco kaj fratam'.  
Rideto kaj manpremo servas kiel vivbalzam'.  
Konsentas la anar' ke ĉiu an' en sia rol'  
La dramon rotarian ludu kun tutkor', bonvol'.

Ho Rotari! Ho Rotari! Jen estas mot' por vi:  
Servemo, fideleco ja nin profitigas pli.  
Ho Rotari! prediku vi, pri fido, ĝoj' kaj am'  
Ĉar bona ag' por ĉielbluo estas ja ornam'.



# 23rd Universal Congress of Esperanto

# 23a Universala Kongreso de Esperanto

Krakow, Poland, Aug. 1-8, 1931

Krakovo, Polujo, Aug. 1an-8an, 1931

## ESPERANTISTS MEET IN CRACOW; 32 NATIONS SEND DELEGATES

(Special Cable to The New York Times)

Warsaw, Aug. 1.—The twenty-third International Esperanto Congress opened at Cracow this evening. Thirty-two nations are represented. Representatives of the Polish and foreign governments are attending the congress, which will last eight days.

All speeches will be made in Esperanto. The well known Esperanto teacher, Mr. Scherer, of California, will deliver lectures.

This is the second Esperanto congress to be held in Cracow, the first having been in 1912.



By De  
HOWARD B. FROST, Riverside, Calif.

Once more the Esperantists of the world have convincingly proved, in general and detail, that Esperanto is well fitted to be a means of international understanding, and is already playing that role very well. I heard that there were about one thousand of us who participated in the Congress in the former capital of Poland; and that was in spite of the regrettable fact that only a very few Germans were able to attend. The Germans were hindered not only by the direct effects of the financial crisis, but especially by a tax of 100 marks for each person leaving the country.

Traveling alone from Copenhagen toward Krakow, I first met Esperantists in a Berlin station, on the morning of July 31, just before my departure for Krakow. But in the train the talkative, hospitable, friendly creatures swarmed. Then began an epidemic of what might be called "intercommunicosis," which fevered the brain and agitated the lips and wearied the tongue. The voice tended especially to make the sounds, "From what land do you come?" Gradually, through the days following, the infection more and more excited the fingers also, producing an almost irresistible itching to obtain signatures and addresses. In spite of the professional efforts of TEKA, the illness left numberless visible traces, especially in Congress books and in notebooks, and even caused some mortality among doubts and sceptical no-

Denove la Esperantistoj de la mondo konvinke pruvis, ĝenerale kaj detale, ke Esperanto bone taŭgas kiel internacia komprenilo, kaj jam tiun rolon bone ludas. Oni diris, ke ni estis ĉirkaŭ 1,000 personoj, kiuj partoprenis la Kongreson en la iama ĉefurbo de Pollando; kaj tio okazis malgraŭ la bedaŭrinda fakto, ke nur tre malmultaj germanoj povis ĉeesti. La germanoj estis malhelpataj ne nur pro la rektaj efikoj de la financa krizo, sed speciale per imposto de 100 markoj po persono por la foriro el la lando.

Vojaĝante sole al Krakovo de Kopenhago, mi unue renkontis Esperantistojn en Berlina stacidomo, matene je la 31a de Julio, ĵus antaŭ la foriro al Krakovo. Sed en la vagonaro la parolemaj, gastigemaj, amikemaj kreitaĵoj svarmis. Tiam komencis epidemio de la tielnominda "interkomuniko," kiu febris en cerboj kaj agitigis lipojn kaj lacigis langojn. La voĉo plej emis fari la sonojn "De kiu lando vi venas?" Grade, tra la tagoj postaj, la infekto pli kaj pli ekscitis la fingrojn ankaŭ, ĝis preskaŭ nerezistebla jukado al akiro de subskriboj de nomoj kaj adresoj. Spite de la profesiaj klopodoj de TEKA (Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio), la malsano lasis sennombrajn videblajn postsignojn, precipe en Kongreslibroj kaj notlibroj, kaj eĉ kaŭzis iom da mortado inter duboj kaj skeptikemoj. Ĉe la

tions. Among the young men, sometimes the whole arm was finally affected; for example, when we went through the cold, poorly lighted galleries of the salt mine at Wieliczka, far beneath the earth's surface, some arms tended to assume an embracing and protective attitude. Obviously, international friendship is very infectious, when the language barriers are absent!

In Berlin, unfortunately, it was found necessary to cancel the Precongress which had been officially planned, and I did not learn until afterward that many Esperantists nevertheless came together there for unofficial entertainment. The Precongress in Breslau, however, was held as planned, and some of us stopped there. We found excellent arrangements; Esperantists met us in the station and gave us a fine auto trip through the city, with visits to the Cathedral, the University, and the great auditorium, the "Jahrhunderthalle." In the evening there was a rather large meeting of Esperantists and others in the City Hall, on formal individual official invitation; there were addresses, in German or Esperanto, with translation, by a city councilman, a university professor, and Esperantists from several countries.

On August 1, five hours of railway travel brought us to Krakow, only one hour before the formal opening of the Congress; the temporary reception room at the station was the scene of great haste to find out about lodgings and to change money. I was accompanied to my lodging place by a uniformed city official, who spoke Esperanto.

I heard that about 1,600 persons attended the formal opening of the Congress in the great auditorium of the Catholic House. This was a very suitable place, except from the acoustic viewpoint; the strong echoes greatly hindered understanding, unless one spoke very clearly and rather slowly. In various meetings, also, both large and small, the street noises from the stone block pavements often were troublesome. There were occasional appeals for slow speaking, and in the third general meeting, on Friday, the speakers generally succeeded well, in spite of the annoying echoes.

In the business meeting, held on Monday, especially impressive was the eloquent address of Mr. J. Forge-Fethke on *Propaganda by Motion Pictures*. This subject was much discussed, and in later meetings its importance was further stressed. On Tuesday, the Universal Esperanto Association met; it was reported that the number of 2,000 places with delegates had been reached, and the new goal of 3,000 places was fixed; other encouraging reports were made, especially by Andreo Ĉe, by Mr. Scherer, and in relation to the success in developing tourist relations between Sweden and Estonia by means of Esperanto. TAGE (World-

junuloj, kelkfoje la tuta brako fine influigis; ekzemple, kiam ni trairis la malvarmajn, malbone lumigatajn galeriojn de la salminejo ĉe Wieliczka, (parolu Vieliĉ ka) profunde sub la tersupraĵo, kelkaj brakoj fariĝis ĉirkaŭprenemaj kaj kvazaŭ ŝirmemaj. Videble la internacia amikeco estas tre infektema, kiam la lingvaj bariloj forestas!

En Berlino, malfeliĉe, oni devis nuligi la oficiale planitan Antaŭkongreson, kaj mi nur poste sciigis, ke multaj Esperantistoj tamen kunvenigis tie por neoficiala gastigo. Sed la Antaŭkongreso en Breslau okazis laŭ la programo, kaj kelkaj el ni tie haltis. Ni trovis bonegajn aranĝojn; oni renkontis nin en la stacidomo, kaj kondukis bonan aŭtomobilon rondiradon tra la urbo, kun vizito al la Katedralo, la Universitato kaj la grandega aŭditorio, la "Jarcenthalo." Vespere okazis iom granda kunveno de Esperantistoj kaj aliaj en la Urbodomo, laŭ formala individua oficiala invito; urbestro, universitata profesoro kaj Esperantistoj el pluraj landoj paroladis, germane aŭ Esperante kun tradukoj. Je la la de Aŭgusto fervoja veturado venigis nin ĝis Krakovo nur unu horon antaŭ la Solena Malfermo de la Kongreso; la tiutempa akceptejo ĉe la stacidomo estis sceno de granda rapidemo pri loĝejoj kaj monŝanĝoj. Min akompanis al mia loĝejo uniforma urba oficisto, kiu parolis Esperante.

Oni diris ke 1,600 personoj ĉestis la Solenan Malfermon en la granda aŭditorio de la Katolika Domo. Tiu estis tre taŭga loko, escepte laŭ la akustika vidpunkto; la fortaj eĥoj multe malhelpis la komprenadon, se oni ne parolis tre klare kaj iom malrapide. En diversaj kunvenoj, ankaŭ, grandaj kaj malgrandaj, la stratbruoj de la ŝtonblokaj pavimaj ofte malhelpis. Oni kelkfoje pledis por malrapida parolo, kaj en la tria ĝenerala kunveno, je vendredo, la parolantoj ordinare bone sukcesis, malgraŭ la ĝenaj eĥoj.

En la lunda labora kunsido, precipe impresa estis la elokventa parolado de Sro. J. Forge-Fethke pri *Propagando per filmo*. Tiu temo multe diskutigis, kaj oni plue akcentis ĝian gravecon en postaj kunsidoj. Mardon la Universala Esperanto Asocio kunvenis; oni raportis la atingon de la nombro de 2,000 lokoj kun delegitoj, kaj fiksas la novan celon je 3,000 lokoj; aliaj kuraĝigaj raportoj estis farataj, precipe de Andreo Ĉe, de Sro Scherer, kaj pri la bona sukceso pri turistaj interrilatiĝoj inter Svedujo kaj Estonujo per Esperanto. TAGE (Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj) ankaŭ kunvenis mardon,

wide Association of Esperantist Teachers) also met on Tuesday, and especially considered methods of instruction—as by pictures, games, etc., with children. Dr. Bujwid, although wearied by his work as President of the Local Congress Committee, presided at the meeting of ISAE (International Scientific Association of Esperantists) on Wednesday, and was active in the meeting of TEKA (World-wide Association of Esperantist Physicians) on Thursday. Mr. Warden, speaking on the pronunciation of Esperanto, said that the Poles seem to have, in general, the best pronunciation of the vowels; with *i*, he warned especially against the use of the sound in the English word *it*; in discussion, it was pointed out that the word *Esperanto* gives a good model for three of the vowels, and also that the weak pronunciation of *r* in English causes especial difficulty in Esperanto, where a weak *r* is not good. On Saturday, Mr. Robert Kreuz, discussing *How Make Our Propaganda More Effective?*, said that Esperanto propaganda must be based on correct psychological principles; we must not tediously repeat mere appeals to accept Esperanto, or make obtrusive the word or the idea; but often it is particularly effective merely to mention some concrete proof of the suitability or the actual usefulness of Esperanto. On Friday evening there was a small gathering which, although incidental and unofficial, very well illustrated the suitability of Esperanto for international meetings; this was a meeting for free discussion of questions of Esperanto usage, where the discussions were very lively, often attaining acerbity, in support of and opposition to various personal opinions.

On Sunday there were church services, both Protestant and Catholic. In the Protestant service, in the church of St. Martin, the pastor made an eloquent plea for Christian love in international relations, and for Esperanto as a very good means for its realization.

Afterward we gathered at the monument to Mickiewicz, and marched together to the street Niecala, which had just been renamed "L. L. Zamenhof Street," and attended the ceremonies at the unveiling of a memorial tablet in honor of the Majstro.

Many and good were the opportunities for becoming acquainted, and for pleasure of various kinds. As also with other affairs of the Congress, I will merely describe some of my own experiences. On Sunday afternoon we went in autobuses to Las Wolski. This beautiful forest covers a hill possibly 100 meters high, and we walked up by a long, winding path under the trees. Finally we reached an open space which gave a magnificent view of the valley of the Vistula. We chattered, some played games, and many had drinks—mainly bottled orangeade from Italy. Then we

kaj precipe, konsideris metodojn de instruado—kiel per bildoj, ludoj, ktp, kun infanoj. Dro. Bujwid, kvankam lacigita de sia laboro kiel Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, prezidis la kunsidon de ISAE (Internacia Scienca Asocio Esperantista) merkredon, kaj estis agema en la kunsido de TEKA jaŭdon. Sro Warden, parolante pri la prononcado de Esperanto, diris ke la poloj ŝajne havas ĝenerale la plej bonan prononcadon de la vokaloj; li avertis, pri *i*, kontraŭ la sono kiel en la angla vorto *it*; en diskuto, oni atentigis ke la vorto *Esperanto* donas bonan modelon por tri vokaloj, kaj ankaŭ ke la malforta prononco de *r* en la angla lingvo kaŭzas specialan malfacilecon en Esperanto, kie malforta *r* ne estas bona. Vendredon, Sro. Robert Kreuz, diskutante *Kiel propagandi pli efike?*, diris ke la Esperanta propagando devas baziĝi sur ĝustaj psikologiaj principoj; oni devas ne tede ripeti alvokojn al Esperantistiĝo, kaj ne tro trudi la nomon aŭ la ideon; sed ofte precipe efikas nura mencio pri ia konkreta pruvo pri la taŭgeco aŭ efektiva utileco de Esperanto. Vendredon vespere okazis malgranda kunsido kiu, kvankam flanka kaj neoficiala, tre bone ilustris la taŭgecon de Esperanto por internaciaj kunsidoj; oni aranĝis kunvenon por laŭvola diskutado de prilingvaj demandoj Esperantaj, kaj la diskuto tre viglis, ofte ĝis ioma akreco, en subteno kaj kontraŭstaro al diversaj personaj opinioj.

Dimanĉon okazis Diservoj, katolika kaj protestanta. Ĉe la protestanta, en la preĝejo de Sta. Martino, la pastro pledis elokvente por kristana amo internacia, kaj por Esperanto kiel tre bona rimedo por efektivigi tion. Poste ni kolektiĝis ĉe la monumento de Mickiewicz (-viĉ) kaj marŝis kune ĝis ulica (strato) Niecala, kiun oni ĵus renomis "ulica L. L. Zamenhof," kaj ĉeestis solenaĵojn ĉe malkovro de memortabulo je la honoro de la Majstro.

Multaj kaj bonaj estis la okazoj por interkonatiĝo kaj diversspeca plezuro. Kiel ankaŭ kun aliaj Kongresaj aferoj, mi nur priskribos kelkajn, kiujn mi spertis. Dimanĉon posttagmeze ni veturis aŭtobuse al "Las Wolski" (Wola Arbaro). Tiu bela arbaro kovras monteton altan eble 100 metrojn, kaj ni suprenpromenis laŭ longa kurbiĝanta irejo sub la arboj. Fine ni atingis senarban lokon, kiu vidigis belegan, pejzaĝon de la valo de la Vistulo. Oni babiladis, kelkaj ĝuis ludojn, multaj trinkis—plejparte botelitan orangeadon italian. Tiam oni havis tre bonan oratoran kon-

had an excellent oratorical contest. On Monday and Tuesday the International Concert was given—twice, for a divided Congress, in the Old Theater. Wednesday evening came a most beautiful “Festival of Polish Music,” in the great courtyard of the old royal castle “Wawel.” On Friday afternoon all work gave place to a great excursion to the salt mine at Wieliczka. A great crowd, apparently more than 1,000 persons, filled a special train with enthusiasm and friendliness. Especially noticeable, at our reception in Wieliczka, were troops of boy scouts and girl scouts. A few at a time we descended the mine shaft in the elevator, and then we walked in a long procession through chilly galleries, and halted in great halls hewn out in the solid salt, which were often ornamented with wonderful sculptures of salt. In one of the halls, little Polish girls gave several beautiful dances. Just before we came out of the mine, we encountered loaded cars from the part of the mine now being worked, and secured souvenirs of salt crystals.

